

Ignacio el Antioĥio

Leteroj

La martiriĝo de Ignacio

El la Greka tradukitaj de Gerrit Isai Berveling

Noto:

Dum mi estis tradukanta tiun ĉi serion da leteroj de Ignacio, cerb-infarkto min trafis. Komence nur ege pene mi povis legi kaj kompreni la legataĵon, sed fine feliĉe mi povis fintraduki la tuton. Ĉirkaŭ 320 el ĉ. 400 paĝoj de tiu ĉi libro LA APOSTOLAJ PATROJ estis pretaj, kiam venis la infarkto. Por memoro restu tiu ĉi atentigo ĉi-loke, ĉar tiu atako okazis ĝuste meze de ĉi tiu serio da leteroj.

Dankon al Dio!

Gerrit Isai Berveling

Enhavo:

La letero de Ignacio al la Efezanoj

La letero de Ignacio al la Magnesianoj

La letero de Ignacio al la Tralesanoj

La letero de Ignacio al la Romanoj

La letero de Ignacio al la Filadelfianoj

La letero de Ignacio al la Smirnanoj

La letero de Ignacio al Polikarpo

La martiriĝo de Ignacio

Broŝure:

Ignacio el Antioĥio

Leteroj

La martiriĝo de Ignacio

El la Greka tradukitaj de Gerrit Isai Berveling

Voĉoj Kristanaj 35

VoKo, Rijswijk 2020

(planita)

Interrete:

al la Efezanoj:

https://el.wikisource.org/wiki/Προς_Εφεσίους_Ιγνάτιος

<https://www.ccel.org/l/lake/fathers/ignatius-ephesians.htm>

al la Magnesianoj:

<https://www.ccel.org/l/lake/fathers/ignatius-magnesians.htm>

al la Tralesanoj:

<https://www.ccel.org/l/lake/fathers/ignatius-trallians.htm>

al la Romanoj:

<https://www.ccel.org/l/lake/fathers/ignatius-romans.htm>

al la Filadelfianoj:

<https://www.ccel.org/l/lake/fathers/ignatius-philadelphians.htm>

al la Smirnanoj:

<https://www.ccel.org/l/lake/fathers/ignatius-smyrnaeans.htm>

al Polikarpo:

https://el.wikisource.org/wiki/Επιστολή_προς_Πολύκαρπον

<https://www.ccel.org/l/lake/fathers/ignatius-polycarp.htm>

Lastfoje kontrolitaj: 2020-04-26. La retpaĝoj de www.ccel.org ne ĉiam alireblas.

La letero de Ignacio al la Efezanoj

Επιστολή του Ιγνατίου προς Εφεσίους

Saluton

Ignacio, ankaŭ nomata Teoforo¹, al la eklezio en Efezo, en Azio², <kiu estas> plenmerite plej feliĉa, benata en grandeco kaj pleneco de Dio la Patro, antaŭdestinita antaŭ la tempoj, ke ĝi estos por daŭra kaj neŝanĝebla gloro, unueca kaj elektita en vera suferado per la volo de la Patro kaj de Jesuo Kristo, nia Dio: plej koran saluton en Jesuo Kristo, kaj abundan ĝojon senmakulan!

Laŭdo al la Efezanoj

1:1 Mi ekkonis vian nomon mult-amatan en Dio, kiun vi akiris justatitole pro la fido kaj amo je Kristo Jesuo, nia Savanto. Kiel imitantoj de Dio, revivigante vin mem per la sango de Dio vi brile plenumis la laboron, kiu decis al vi: 2 Ĉar kiam apenaŭ vi aŭdis, ke <mi alvenis> katenita pro nia komuna nomo³ kaj espero, <mi> esperanta, ke pro viaj preĝoj mi ekhavos la eblon bestobatali⁴ en Romo, por ke estu donite al mi fariĝi per

¹ Laŭlitere: Di-portanto. Komparu kun la nomo Kristoforo – Krist-portanto.

² Nuna Turkujo.

³ Kristano.

⁴ Morti martire en Koloseo aŭ simile, batalante kontraŭ sovaĝaj bestoj. Vidu ekzemple en *Pasiono de Perpetua kaj Feliĉita*, Voĉoj Kristanaj 24, 1996.

tio vera lernanto <lia>⁵, vi tuj alhastis vidi min. 3 Ĉar tiel vian tutan amason en la nomo de Dio mi bonvenigis en la persono de Onesimo, homo de nedirebla amo, ĉi-karne via episkopo, kiun mi preĝas ke vi amu laŭ Jesuo Kristo, kaj mi esperas, ke vi serĉu imiti lin. Benata ja estu Li, kiu bonvolis vin fari indaj havi tiel bonan episkopon.

Bondeziroj

2:1 Koncerne mian kun-serviston Burho, vian diakonon laŭ Dio, benatan en ĉiuj aferoj, mi petas, ke li plu restu ĉe mi, por honori vin kaj vian episkopon. Kaj ankaŭ Krokuso, inda je vi kaj je Dio, kiun mi vidis kiel signon de via amo, al mi ĉiurilate <ĉion> senpezigis, same kiel lin refreŝigu la Patro de Jesuo Kristo – tutsame kiel al Onesimo, Burho, Eŭplo kaj Frontono, tra kiuj vin ĉiujn mi ekkonis en amo. 2 Daŭre mi ĝoju pri vi en ĉio, se tion mi meritis! Estas ja inde, ke en ĉiu maniero vi gloru Jesuon Kriston, kiu gloris vin, por ke kunigitaj en unuanima submetiĝo, submetitaj al la episkopo kaj al la presbiteraro, vi estu sanktigitaj en ĉio.

Instigo al unueco

3:1 Mi ne ordonas al vi, kvazaŭ mi estus gravulo. Ĉar kvankam mi estas kaptito pro la nomo <de Kristo>, mi ankoraŭ ne estas perfekta en Jesuo Kristo. Mi ja ĵus komencis mian disĉiplecon, kaj mi parolas al vi kiel al miaj kun-disĉiploj. Ĉar estis necese, ke kiel atleto⁶ mi estu oleita de vi en la fido, en admono, en pacienco, en indulgenco. 2 Sed ĉar la amo ne lasas min silenti pri vi, tial mi ekprenis sur min, instigi vin, ke vi kunkuru konkorde al la penso de Dio. Ĉar ankaŭ Jesuo Kristo, nia nedisigebla vivo, <estas> penso de la Patro; same kiel la episkopoj, establita kiel la limigantoj de la tero, estas en la penso de Jesuo Kristo.

4:1 Estas do inde, ke vi kun-kuru konkorde kun la penso de la episkopo, kion vi ankaŭ faras. Ĉar via prave fama presbiteraro, inda je Dio, tiel

⁵ De Kristo («surprenu mian krucon ...»).

⁶ La bildo de sportistoj, kiuj vetkuras, ankaŭ estas uzata de Paŭlo: 1 Korintanoj 9:24-27.

bone harmonias al la episkopo, kiel la kordoj al la citro. Tial en via unuanimeco kaj en via harmonia amo, Jesuo Kristo estas kantata. 2 Kaj ĉiuj kune vi fariĝu ĥoro, por harmonie kaj unuanime, alprenante la tembron de Dio en via unueco, unuvoĉe kanti per Jesuo Kristo por la Patro, por ke Li aŭskultu vin kaj konstatu el la bonaĵoj, kiujn vi faras, ke efektive membroj vi estas de Lia Filo. Estas inde do, ke vi tenu vin en senriproĉa unueco, por ke ĉiam vi restu unuigitaj kun Dio.

La episkopo, signo de unueco

5:1 Ĉar se en tiel mallonga tempo tian familiarecon mi ekhavis kun via episkopo – ne laŭhoman, sed spiritan –, kiom pli mi kredu vin feliĉaj, kiuj estas tiel bone agorditaj, kiel la eklezio al Jesuo Kristo aŭ kiel Jesuo Kristo al la Patro, tiel ke ĉio kongruu en unueco! 2 Neniu trompu sin mem: se iu ne estas interne de la sanktejo, li maltrafas la panon de Dio.

Ĉar se la preĝo de unu aŭ du personoj estas tiel forta, kiom pli do tiu de la episkopo kaj de la tuta eklezio! 3 Do, kiu ne akordas kun la komunumo <de la Eklezio>, tiu jam estas fierulo kaj kondamnis sin mem, ĉar estas skribite: *La fierulojn Dio rezistas*⁷. Ni do atentu, ke la episkopon ni ne rezistu, por ke ni restu submetitaj al Dio.

La episkopon ni respektu kvazaŭ la Sinjoron mem

6:1 Ju pli iu vidas, ke la episkopo silentas, des pli li respektu lin; ĉar ĉiun, kiun sendas la domestro al sia propra mastrumaĵo, ni tiel devas akcepti, kiel lin mem, kiu sendis. Do la episkopon – klare, ke tiun necesas rigardi kiel la Sinjoron mem. 2 Nu, Onesimo plej laŭdas vian disciplinon en Dio, ke ĉiuj vi vivas laŭ la vero kaj ke inter vi loĝas neniu herezo. Ĉar neniun vi aŭskultas alian krom nur Jesuon Kriston, kiu parolas la veron.

Atentu pri falsaj predikistoj

7:1 Kelkaj ja kutimas kolportadi sub falsaj trompoj la Nomon, sed per tio ili faras ion neindan je Dio; tiujn vi evitu kiel sovaĝajn bestojn. Estas ja

⁷ Sentencoj 3:34.

hundoj rabiaj, kiuj kaŝe mordas; pri tiuj vi gardu vin, ĉar tiuj homoj apenaŭ estas kuraceblaj. 2 Sed estas unu Kuracisto, same en la korpo kaj en spirito, naskita kaj nenaskita, Dio estanta en la korpo, en la morto vera vivo, filo de Maria kaj de Dio, unue suferipova, poste nesuferipova, Jesuo Kristo, nia Sinjoro.

Tute en Dio

8:1 Neniu trompu vin, kiel efektive neniu trompas vin, ĉar vi tute estas de Dio. Ĉar se neniu kverelo okazas inter vi, kiu povus turmenti vin, vi do vivas laŭ Dio. Rubaĵo via mi estas kaj mi prezentas min kiel purigan oferon por vi, Efezanoj, eklezio fama en la tuta mondo. 2 La homoj ĉi-karnaj ne povas plenumi agojn spiritajn, nek la spiritaj homoj tiujn de la karno ; same kiel la fido ne tiujn de la senfido, aŭ la senfido la agojn de la fido. Sed eĉ kion vi faras laŭ la karno, estas agoj spiritaj; ĉar en Jesuo Kristo ĉion vi faras.

Kontraŭ la semantoj de malbona instruo

9:1 Tamen mi aŭdis pri kelkaj, kiuj pasis de ĉi tie al vi, kun malbona instruo; tiujn vi ne lasis semi inter vi, ŝtopante al vi la orelojn, por ke vi ne ricevu tion, kion ili semis, ĉar ŝtonoj vi estas de la templo de la Patro, pretigitaj por la konstruo de Dio la Patro, suprenigitaj al la alto per la ilo de Jesuo Kristo, kiu estas la kruco, uzante la Sanktan Spiriton kiel ŝnuron; ĉar via fido estas la levilo, kaj la amo la vojo kondukanta vin al Dio. 2 Do vi ĉiuj estas kunvojaĝantoj, Di-portantoj⁸ kaj templo-portantoj, Kristo-portantoj, portantoj de sankteco, en ĉio ornamitaj per la ordonoj de Jesuo Kristo; tial mi ĝojas, ke mi fariĝis inda per ĉi letero, kiun mi skribas, alparoli vin kaj kunĝoji, ĉar laŭ <via> nova vivo nenion vi amas krom sole nur Dion.

⁸ Efektive: Teoforoj, kiel singulare li indikis sin komence de la letero, kaj Naoforoj, Kristoforoj kaj Hagioforoj.

La kristanoj antaŭ la paganoj

10:1 Koncerne la ceterajn homojn, preĝu senĉese, ĉar pri ili estas espero je konvertiĝo, por ke ili trovu Dion. Sed lasu ilin almenaŭ esti instruitaj de viaj agoj. 2 Al iliaj koleratakoj reagu per via mildeco, al iliaj orgojlaj diroj per via humilo; kontraŭmetu al iliaj blasfemaĵoj viajn preĝojn, kontraŭ iliajn erarojn montru vin fonditaj en la fido, kontraŭ ilia kruelo montru vian dolĉecon, sen viaflanke imiti ilin. 3 Ni montriĝu iliaj fratoj en ĉia deco; ni klopodu por esti imitantoj de la Sinjoro – kiu ja estis pli maljuste traktita, kiu pli povra, kiu pli kondamnita? tiel neniu kreskaĵo de la diablo estu trovita inter vi, sed vi restu en ĉia sankteco kaj sobreco en Jesuo Kristo, laŭ la karno same kiel laŭspirite.

Timu Dion

11:1 <Estas> la lastaj tempoj; tial ni estu respektplenaj, ni timu la paciencon de Dio, ke ĝi ne fariĝu al ni je kondamno. Ĉar aŭ la venontan koleron ni timu aŭ ĉeestantan gracon ni amu – unu el ĉi ambaŭ. Nur en Kristo Jesuo <eblas> troviĝi en la vera vivo. 2 Ekster li, nenio allogu vin, en li miajn katenojn mi portas, ĉi spiritajn perlojn, en kiuj mi leviĝu per via preĝado, pri kiu mi petegas, ke ĉiam mi restu kunsupertanto, por ke mi troviĝu en la nombro de la Efezaj kristanoj, kiuj ĉiam estis unuanimaj kun la apostoloj per la forto de Jesuo Kristo.

Memoro pri Paŭlo

12:1 Mi scias, kiu mi estas kaj al kiuj mi skribas. Mi kondamnito, vi indulgitoj; mi sub danĝero, vi ekster danĝero. 2 Trapasejo vi estas por tiuj, kiuj estas forprenitaj al Dio, kuninicitoj de Paŭlo, la sankta, la martirigito, la beata, ĉe kies piedsignoj mi estu trovita, kiam Dion mi atingos; en ĉiuj leteroj li menciis pri vi en Jesuo Kristo.

Eŭĥaristio kaj paco

13:1 Pleje klopodu por kunvenadi ĉe la dankodiro al Dio kaj por glori Lin. Ĉar se regule vi kunvenas, neniigas la fortoj de Satano, kaj per via unuanimeco de la fido malebliĝas la neniigo, kiun li celas. 2 Nenio estas

pli valora ol paco, en kiu ĉiu militado finiĝas, ĉe tiuj en la ĉielo kaj ĉe tiuj sur la tero.

Fido kaj amo

14:1 Nenio el tio ĉi estas kaŝita por vi, ĉar la fidon kaj la amon vi perfekte direktas al Jesuo Kristo: tio estas komenco kaj fino de la vivo; komenco ja estas la fido, fino la amo. Tiuj du en unueco estas Dio, kaj ĉio cetera necesa por bona kaj inda vivo estas ĝia sekvo. 2 Neniu, kiu vere konfesas la fidon, pekas, kaj neniu, kiu amas, povas malami. La arbo fariĝas klara el ĝiaj fruktoj: tiel tiuj, kiuj konfesas sin kristanoj, estas koneblaj el kion ili faras. Ĉar ne temas pri nura konfeso, sed oni devas esti trovita senfine en la forto de la fido.

Silenti kaj agi

15:1 Estas preferinde silenti kaj esti <kristano> ol paroli kaj ne esti. Bele estas instrui, se kiu instruas, agas. Estas ja unu Instruisto, kiu *Diris, kaj ĝi fariĝis*⁹. Kaj kion silentante li faris, estas inda je la Patro. 2 Kiu posedas la parolojn de Jesuo, tiu envere aŭskultu lian silenton, por fariĝi perfekta, por agi en kion li diras kaj rekoniĝi en kion li silentis. 3 Nenio estas kaŝita antaŭ la Sinjoro, sed niaj kaŝitaĵoj mem estas tuj apud li. Ĉion ni do faru, kvazaŭ li loĝus ĉe ni, por ke ni estu liaj tempoj kaj li mem en ni estu nia Dio, kio efektive li estas kaj manifestiĝos antaŭ nia vizaĝo. Tial prave ni amu lin.

La sorto de falsaj predikistoj

16:1 Ne trompiĝu, miaj fratoj. Kiuj koruptas familion, *ne heredos la Regnon de Dio*. 2 Se do mortas tiuj, kiuj faras tiun pekon laŭ la karno, kiom pli do, se per falsa instruo iu koruptas la fidon je Dio, pro kiu Jesuo Kristo estis krucumita?! Tia persono, iĝinte malpura, iros en neestingeblan fajron, same kiel ĉiu, kiu aŭskultas lin.

⁹ Psalmo 33:9; 148:5.

La ŝmiraĵo de la Sinjoro

17:1 Pro tio la Sinjoro akceptis ŝmiraĵon sur la kapon¹⁰, por ke li elspiru senmortecon en la eklezion. Ne akceptu stinkan ŝmiraĵon de l' instruoj de la Princo ĉi-monda, por ke tiu ne forkaptu vin el la vivo, kiu kuŝas antaŭ vi. 2 Kial ne ĉiuj ni estas prudentaj, ĉar ni ja ricevis scion pri Dio, kiu estas Jesuo Kristo? Kial stulte ni pereas, ne rekonante la gracon, kiun la Sinjoro vere sendis al ni?

Ignacio, rubo de la kruco

18:1 Rubo estas mia spirito de la kruco¹¹: tio estas faligilo por la nefidantoj, sed por ni savo kaj eterna vivo. Kie estas la saĝulo? Kie la diskutisto? Kie la fanfaronado de tiuj, kiuj nomiĝas inteligentaj? 2 Ĉar nia Dio Jesuo Kristo estis koncipita de Maria, laŭ ordigado de Dio, el la semo de David, el Sankta Spirito; li naskiĝis, kaj estis baptita, por ke la akvon per sia Pasiono li purigu.

La silento de la kriptaj misteroj

19:1 Kaj kaŝita estis por la Princo ĉi-monda la virgeco de Maria kaj same ŝia naskito, same kiel la morto de la Sinjoro; tri misteroj kriptaj, kiuj fariĝis en Dia silento.

2 Kiel do li manifestiĝis al la mondo? Stelo sur la ĉielo ekbrilis pli ol ĉiuj ceteraj steloj, kaj ĝia lumo estis nepriskribebla kaj ĝia noveco frapis per fremdeco; ĉiuj ceteraj steloj kune kun suno kaj luno formis ĥoron por tiu stelo, kaj ĝia lumo superis ĉiujn; estis konsterniĝo, de kie do venis tiu noveco tiom malsimila al ili. 3 Tiumomente neniĝis ĉia speco de magio kaj ĉiu malica kateno malaperis; senscio kolapsis, kaj la malnova Regno estis nuligita, ĉar Dio montriĝis homforme, por la noveco de eterna vivo; komenciĝis tio, kio ĉe Dio jam estis preparita. Ekde tiam ĉio ekmoviĝis, ĉar estis ekzercata la malfondo de la morto.

¹⁰ Komparu kun Mateo 26:6-13.

¹¹ Enigma esprimo: li taksas sin mem rubo – ĉu *kompere* al la kruco de Jesuo?

Promeso de dua letero

20:1 Se Jesuo Kristo min trovas inda, pro viaj preĝoj, kaj se estos lia volo, en dua skribaĵo, kiun mi intencas sendi al vi, mi plu klarigos al vi, kiel mi jam komencis, pri la ordigado¹² direkita al la nova homo, Jesuo Kristo, en lia fido kaj en lia amo, en lia Pasiono kaj en lia resurekto. 2 Precipe se la Sinjoro malkaŝos al mi, ke vi – homo post homo – ĉiuj kunvenas en la graco, kiu venas el lia nomo, en unu fido kaj en Jesuo Kristo, laŭ la karno el la semo de David, la filo de homo kaj Filo de Dio, por ke vi obeu al la epikopo kaj al la presbiteraro en ne-dividita menso, unu panon rompante, kiu estas medicino de senmorteco, kontraŭveneno de la morto, sed por la vivo en Jesuo Kristo por ĉiam.

Fino

21:1 Mi donas mian vivon por vi kaj por tiuj, kiujn por honori Dion vi sendis al Smirno, el kie mi skribas al vi, dankante la Sinjoron, kaj kun amo al Polikarpo same kiel al vi. Memoru min, kiel ankaŭ vin <memoras> Jesuo Kristo. 2 Preĝu por la eklezio, kiu estas en Sirio, de kie en katenoj mi estas survoje al Romo, kiel la lasta el la fiduloj tieaj, kiel mi estis juĝita inda elektiĝi por honori Dion.

Saluton en Dio la Patro kaj en Jesuo Kristo, nia komuna espero.

¹² Laŭ Ignacio Dio anticipe planis – ordigis – ĉion, antaŭvidante la homan historion kaj la neceson, ke Jesuo naskiĝu por per sia morto surkruca neniigi la morton kaj savi la homojn.

*La letero de Ignacio al la Magnesianoj*¹³

Επιστολή του Ιγνατίου προς Μαγνησιείς

Saluton

Ignacio, ankaŭ nomata Teoforo¹⁴, al la <eklezio> benata en la graco de Dio la Patro kaj Kristo Jesuo nia Savanto, en kiu mi salutas la eklezion, kiu estas en Magnesio ĉe Meandro, kaj mi preĝas en Dio la Patro kaj en Jesuo Kristo: plejan ĝojon!

Mi ĝojas pro vi kaj viaj senditoj

1:1 Sciante pri via disĉiplineco en la amo al Dio, kun granda ĝojo mi decidis alparoli vin en la fido je Jesuo Kristo. 2 Trovita inda je la plejdia nomo, en la katenoj, kiujn mi portas, mi ekkantas al la eklezioj, en kiuj mi preĝas pri unueco kun karno kaj spirito de Jesuo Kristo, nia vivo por ĉiam, en fido kaj amo, ol kio nenio estas preferinda, kaj kio plej gravas, kun Jesuo kaj la Patro. Se ni eltenas la atakojn de la Princo de ĉi mondo kaj eskapas, ni atingos Dion.

2:1 Ĉar do mi meritis vidi vin, en la persono de Damaso, via mirinda episkopo kaj viaj indaj presbiteroj Baso kaj Apolonio kaj mia kunsklavo la diakono Zotiono, kies amikecon mi daŭre ĝuu; ĉar li estas submetita al

¹³ Magnesio – urbo ĉe la rivero Meandro en sudo de nuna Turka marbordo.

¹⁴ Laŭlitere: Di-portanto. Komparu kun la nomo Kristoforo – Krist-portanto.

la episkopo kiel al la graco de Dio kaj al la prebiteraro kiel al la leĝo de Jesuo Kristo, <mi nun skribas al vi>.

Dio la Patro, episkopo de ĉiuj

3:1 Nu, decas al vi ne misuzi la junaĝon de via episkopo, sed pro la forto de Dio la Patro doni al li ĉian respekton, kiel mi scias, ke faras la sanktaj presbiteroj, kiuj juĝas tro haste pro lia videbla junaĝa aspekto, sed kiel mem saĝaj en Dio, konsentas kun li –, aŭ ne kun li, sed kun la Patro de Jesuo Kristo, la episkopo de ĉiuj. **2** Por honoro Lin do, kiu deziris nin, decas ke vi obeas la episkopon sen ajna hipokriteco; ĉar neniu erarigus tiun videblan episkopon, sed la nevideblan oni trompus. Tio ĉi ne temas pri la karno, sed pri Dio, kiu vidas ĉiujn sekretojn.

Sincere en nia vivo

4:1 Konvene estas ne nur nomiĝi kristanoj, sed ankaŭ esti tiaj; kiel kelkaj iun nomas episkopo, sed ĉion faras sene de li. Tiaj homoj ne ŝajnas al mi havi bonan konsciencan, ĉar ili ne kuniĝas <por la diservo> laŭ la ordono.

Du moneroj kaj ties bildoj

5:1 Nu, ĉio havas finon, kaj ĉi ambaŭ samtempe kuŝas antaŭ ni – la morto kaj la vivo – kaj ĉiu iros al sia propra loko, **2** kiel ankaŭ estas du specoj de moneroj, tiu de Dio kaj tiu de ĉi mondo, kaj ambaŭ el ili havas sian propran bildon stampita sur si, la senfiduloj tiun de ĉi mondo, la fiduloj en la amo la bildon de Dio la Patro pere de Jesuo Kristo, kaj se per li ni ne estas pretaj morti en lian Pasionon, lia vivo ne estas en ni.

Vokitaj al unueco

6:1 Ĉar en la antaŭe menciitaj personoj mi vidis vian tutan amason en la fido, kaj ekamis ilin, mi nun admonas vin klopodi por fari ĉion en Dia harmonio, dum via episkopo prezidas anstaŭ Dio kaj viaj presbiteroj anstataŭ la asambleo de la apostoloj, kun viaj diakonoj, kiuj plej dolĉas al mi kaj al kiuj estas konfidata la diakoneco de Jesuo Kristo, kiu antaŭ la

komenco de la tempo estis kun la Patro kaj manifestiĝis en la fino de la tempo. 2 Ĉiuj vi do, imitante la saman Dian agadon, respektu unu la alian kaj neniu juĝu la alian laŭ la karno, sed en Jesuo Kristo amu vi ĉiujn por ĉiam. Nenio estu inter vi, kio povus dividi vin, sed estu unuigitaj kun la episkopo kaj kun tiuj, kiuj prezidas, kiel tipo kaj pruvo de via senmorteco.

Faru nenion sen episkopo kaj presbiteroj

7:1 Kiel do la Sinjoro faris nenion sen la Patro, ĉar li estis unu kun Li – nek per si mem, nek per la apostoloj –, tiel ankaŭ vi faru nenion sen la episkopo kaj la presbiteroj; ne strebu, ke io ajn aspektu laŭdinda kion vi faras nur vi mem aparte, sed estu kune en unu loko, estu unu preĝo, unu deziro, unu menso, unu espero en amo, en senmakula ĝojo. Estas nur unu Jesuo Kristo – pli bona estas nenio. 2 Ĉiuj vi do kun-kuru en unu templon de Dio, kiel al unu altaro, al la unu Jesuo Kristo, kiu devenis el la unu Patro, kaj estas kun tiu unu kaj reiris al Li.

Averto kontraŭ falsaj instruoj

8:1 Ne lasu vin erarigi de la falsaj instruoj, nek de malnovaj rakontoj, kiuj estas utilaj por nenio. Ĉar se ni eĉ ĝis nun vivas laŭ la Juda stilo, ni rekonas, ke la gracon ni ne ricevis. 2 Ĉar la plej Diaj profetoj vivis laŭ Kristo Jesuo; tial ili estis persekutitaj, ĉar ili estis inspiritaj de lia graco por plene konvinki la nefidulojn, ke estas nur unu Dio, kiu manifestis Sin mem en Sia Filo Jesuo Kristo, kiu estas Lia eterna parolo devenanta el silento, kaj kiu en ĉio plaĉis al Li, kiu sendis lin.

La profetoj, disĉiploj de Kristo

9:1 Se do tiuj, kiuj vivis en la malnova ordo de l' aferoj, venis al nova espero, ne plu festante la sabatojn, sed vivante laŭ la celebrado de dimanĉoj, la tago, en kiu ankaŭ nia vivo komenciĝis per li kaj lia morto, kiun misteron kelkaj neas, sed per ĝi ni ekhavis la fidon, kaj tial ni suferas, kaj tial ni eltenas, por ke ni montriĝu disĉiploj de Jesuo Kristo, nia sola instruisto. 2 Kiel ni povos vivi sen li, kies disĉiploj en la Spirito

estis ankaŭ la profetoj, kiuj antaŭe atendis lin kiel instruiston? Kaj tial, kiam li venis, kiun ili atendis, li levis ilin el la morto.

Nova fermentaĵo

10:1 Ni ne estu indiferentaj pri lia boneco al ni; ĉar se li imitus nin laŭ niaj agoj, ni ne plu ekzistus. Tial, fariĝinte liaj disĉiploj, ni lernu vivi laŭ la Kristanismo. Kiu ja nomiĝas per alia vorto ol tio, ne estas de Dio. 2 Flankenmetu do la malbonan fermentaĵon, kiu malnoviĝis kaj acidiĝis, kaj transiru al nova fermentaĵo, kio estas Jesuo Kristo. Estu salitaj en li, por ke neniu el vi putriĝu, ĉar laŭ la odoro vi estos juĝitaj. 3 Absurde estas paroli pri Jesuo Kristo kaj vivi Judece. Ĉar Kristanismo ne akceptis Judismon, sed Judismo akceptis Kristanismon, en kiun kuniĝas ĉiu lango kiu fidus je Dio.

Mi skribas tion ĉi por averti vin

11:1 Tion ĉi, miaj plej karaj, <mi skribas> ne, ĉar mi scias, ke kelkaj el vi tiel kondutas, sed kiel plej malgranda inter vi mi deziras averti vin anticipe, ke vi ne falu en kaptilojn de vanaj doktrinoj, sed ke komplete vi pleniĝu de la naskiĝo, la Pasiono kaj la resurekto, kiuj okazis en la tempo de la estrado de Poncio Pilato: plenumitaj vere kaj efektive de Jesuo Kristo, nia espero, de kiu neniu el vi iam ajn forturniĝu!

Vi superas min

12:1 En ĉio al mi estu donite, ĝui de vi, se envere mi estas inda. Ĉar kvankam mi estas katenita, mi ne povas kompari min kun unu el vi, kiuj estas liberaj. Mi scias, ke vi ne fanfaronas; vi ja havas Jesuon Kriston en vi. Kaj eĉ pli, kiam mi laŭdas vin, mi scias, ke vi flegas modeston, kiel estas skribite: La justulo kulpigas sin mem.

Rea alvoko al unueco

13:1 Metu do vian penadon en la fortigo de la instruoj de la Sinjoro kaj de la apostoloj, por ke ĉio, kion vi faras, estu ĝuste direktita en la karno kaj la spirito, en fido kaj amo, en la Filo kaj la Patro kaj la Spirito, en

komenco kaj fino, kune kun la plej inda episkopo kaj meritplena spirita krono de via presbiteraro kaj de viaj diakonoj, kiuj estas laŭ Dio. 2 Estu submetita al via episkopo kaj unuj al la ceteraj, kiel Jesuo Kristo al la Patro laŭ la karno kaj la apostoloj al Kristo kaj la Patro kaj la Spirito, por ke estu unueco laŭkarna kaj spirita.

Necesas viaj preĝoj

14:1 Ĉar mi scias, ke vi estas plenaj de Dio, nur mallonge mi admonas vin. Memoru pri mi en viaj preĝoj, por ke mi atingu Dion, kaj pri la eklezio en Sirio, kies membro mi ne meritas nomiĝi; ĉar mi bezonas vian unuecan preĝon en Dio, kaj vian amon, por ke la eklezio en Sirio meritu refreŝiĝi pere de via eklezio.

Salutoj

15:1 Salutas vin la Efezanoj el Smirno, de kie mi skribas al vi, kiuj estas tie pro la honoro de Dio same kiel ankaŭ vi mem, kaj kiuj en ĉio refreŝigis min kune kun Polikarpo, la episkopo de la Smirnanoj. Ankaŭ la ceteraj eklezioj salutas vin en honoro de Jesuo Kristo. Fartu bone en la harmonio de Dio, vi kiuj ricevis la nedisigeblan Spiriton, kiu estas Jesuo Kristo.

*La letero de Ignacio al la Tralesanoj*¹⁵

Επιστολή του Ιγνατίου προς Τραλλιανούς

Saluton

Ignacio, ankaŭ nomata Teoforo¹⁶, al la <eklezio> amata de Dio la Patro de Jesuo Kristo, la sankta eklezio, kiu estas en Traleso en Azio, la elektita kaj al Dio inda <eklezio>, kiu vivas en paco en la karno kaj en la spirito pro la Pasiono de Jesuo Kristo, nia espero por resurekto en li mem: tiun <eklezion> mi salutas en la pleneco en apostola karaktero kaj mi preĝas: plejan ĝojon!

Laŭdo pri la adresitoj

1:1 Mi scias, ke vi havas senriproĉan kaj sinceran menson kun pacienco, kaj ne nur pro ekzercado sed laŭnature, kiel klarigis al mi via episkopo Polibio, kiu laŭ deziro de Dio kaj Jesuo Kristo en Smirno vizitis min, kaj tiel li kunĝojis kun mi, katenito en Kristo Jesuo, ke en li mi ekvidis vian tutan amason. 2 Ricevinte do pere de li vian bonvolemon laŭ Dio, mi estis en gloro, ĉar vin – kiel mi jam sciis – mi trovis imitantoj de Dio.

¹⁵ Tralles urbo ĉe la rivero Meandro.

¹⁶ Laŭlitere: Di-portanto. Komparu kun la nomo Kristoforo – Krist-portanto.

La vivo laŭ Kristo

2:1 Ĉar vi ja submetiĝis al la episkopo kiel al Jesuo Kristo, mi ŝajnas al mi ne vivi laŭ la homo, sed laŭ Jesuo Kristo, kiu mortis pro ni, por ke, fidante je lia morto, vi eskapu la morton. 2 Estas do necese, kiel efektive vi faras, ke nenion vi entreprenu sen la episkopo, sed submetiĝu ankaŭ al la presbiteraro kiel al la apostoloj de Jesuo Kristo, nia espero, en kiu ni montriĝos esti vivaj. 3 Ankaŭ la diakonoj, kiuj estas <servantoj> de la misteroj de Jesuo Kristo, en ĉiu maniero devas esti plaĉaj al ĉiuj; ĉar ili ne estas servantoj de manĝo kaj trinko, sed servantoj de la eklezio de Dio. Necesas do deteni sin de akuzoj kontraŭ ili, kvazaŭ de fajro.

Sen hierarĥio ne estas eklezio

3:1 Same ĉiuj respektu la diakonojn kiel Jesuon Kriston, kaj la episkopon kiel bildon de la Patro, la presbiterojn kiel la sinedrion de Dio kaj kiel la asembleon de la apostoloj. Ekster ili nenio nomiĝas eklezio. 2 Koncerne ilin ĉiujn mi estas konvinkita, ke vi samopinias. Ĉar manifestiĝon de via amo mi ricevis de vi – kaj havas ankoraŭ ĉe mi – en via episkopo, kies sola ĉeesto estas granda instruo, kaj kies mildeco estas forto; lin, mi kredas, eĉ la sendiuloj respektas. 3 El amo al vi mi min retenas, kvankam mi povus skribi pri tio pli akre. Mi ja ne ekhavis tiel altan memestimon, ke estante kondamnito mi donu ordonojn al vi, kvazaŭ mi estus apostolo!

Timo pri sinlaŭdo

4:1 Multan scion mi havas en Dio, sed mi retenas min, por ke en la sinlaŭdado mi ne pereu. Ĉar nun nepras, ke mi estu pli timida kaj ne atentu tiujn, kiuj igas min vanti. Ĉar kiuj grandigas min, skurĝas min. 2 Ĉar mi amas suferi, sed mi ne scias, ĉu mi indas. Ĉar tiu deziro por multaj ne estas klara, sed min ĝi des pli sieĝas. Mi do bezonas mildecon, por ke la princo de ĉi mondo neniĝu per tio.

Mi ne instruos profundajn doktrinojn

5:1 Ĉu mi ne kapablu skribi al vi pri la ĉielaj aferoj? Sed mi timas, ke al la infanetoj <en Kristo>, kiuj vi estas, mi malutilus; pardonu min, ke mi ne faros, ĉar, se vi ne povus bone digesti <tiajn doktrinojn>, vi povus sufokiĝi de ĝi. 2 Ĉar mi ja, katenita <pro Kristo> kaj <tial?> kapabla kompreni la ĉielajn aferojn kaj la anĝelajn hierarĥiojn kaj la kunvenojn de iliaj gvidantoj, la videblajn kaj la nevideblajn, tiurilate ankaŭ mi estas ankoraŭ lernanto. Multo ankoraŭ mankas al ni, por ke ni ne perdiĝu je Dio.

Retenu vin de herezo

6:1 Tial ne mi, sed la amo je Jesuo Kristo, alvokas vin: uzu nur kristanan nutraĵon, retenu vin de alidevenaj herbaĵoj, k. e. herezo. 2 Tiuj ja intermiksas Jesuon Kriston kun la propraj spekulajoj, kvazaŭ ili estus plene fidindaj, dum efektive mortigan venenon ili donas kun mielvino, kiun la nescianto facile konsumas kun fatala plaĉo, kiu kondukas al la morto.

7:1 Gardu vin do kontraŭ tiuj! Kaj tiaj vi estos, se vi ne estos vantaj kaj restos nedisigeblaj de nia Dio Jesuo Kristo kaj de la episkopo kaj la ordonoj de la apostoloj. 2 Kiu estas interne de l' altaro, estas pura; sed kiu estas ekster la altaro, ne estas pura; t. e. kiu ion faras fore de la episkopo, la presbiteraro kaj la diakonoj, tiu estas ne pura en la konscienco.

La fido – karno de l' Sinjoro; la amo – sango de l' Sinjoro

8:1 Ne, ke mi scius, ke io tia estas inter vi, sed mi protektas vin, ĉar vi estas miaj tre amataj, kaj mi antaŭvidas la embuskojn de la diablo. Tial, vestante vin per mildeco, rekonstruu vin mem en la fido, kiu estas la karno de l' Sinjoro, kaj en la amo, kiu estas la sango de Jesuo Kristo. 2 Neniu el vi rankoru kontraŭ la proksimulo. Ne prezentu ekskuzon al la

paganoj, por ke ne kaŭze de kelkaj malsaĝuloj oni blasfemu la amason de la fiduloj. *Ĉar ve, pro kies frivoleco Mia nomo de kelkaj estas blasfemata*¹⁷.

*Kontraŭ la Doketismo*¹⁸

9:1 Ŝtopu viajn orelojn, do, kiam iu parolas al vi disde Jesuo Kristo: li devenis de David, el Maria, li vere naskiĝis, manĝis kaj trinkis, vere estis persekutita de Poncio Pilato, vere estis krucumita, kaj mortis, dum vidis tion ĉio en la ĉielo, sur la tero kaj en la subterejo; **2** li ankaŭ vere resurektis el la mortintoj, ĉar levis lin lia Patro, kaj similmaniere ankaŭ nin, kiuj fidas je li, tiel same vekos lia Patro en Jesuo Kristo, ekster kiu la veran vivon ni ne posedas. **10:1** Sed se, kiel kelkaj sendiuloj, t. e. kelkaj sen la fido, asertas, ke li ŝajnis suferi – ili mem ŝajnas ekzisti! –, kial do mi estas katenita? Kial mi do esperas batali kontraŭ la bestoj¹⁹? Mi do senkiale mortos! Mi do false atestas pri la Sinjoro!

Kion ne plantis la Patro

11:1 Fuĝu do la malbonajn ŝosojn <de Satano>, kiuj portas mortigajn fruktojn. Se iu gustumos, li tuj mortos pro ili, ĉar ili ne estas plantaĵo de la Patro. **2** Se ili ja estus, aperus ja branĉoj de la kruco, kaj ties frukto estus nepereema: la kruco, per kiu en sia pasiono li vokas vin, kiel siajn membrojn. La kapo ja ne povas naskiĝi disde siaj membroj, ĉar Dio promesis la unuecon, kiu Li mem estas.

Salutoj

12:1 Mi salutas vin el Smirno, kune kun la eklezioj de Dio kiuj estas kun mi, kiuj en ĉio refreŝigis min, en la karno kaj en la spirito. **2** Instigas vin miaj katenoj, kiujn mi portas pro Jesuo Kristo, preĝante ke Dion mi trafos: daŭrigu en via harmonio kaj komuna preĝado. Ĉar decas al vi ĉiuj

¹⁷ Komparu kun Jesaja 52:5.

¹⁸ En PIV: docetismo. Tamen la vorto venas ne de la Latina docere = instrui, sed de la Greka δοκεῖν (dokein) ≈ ŝajni, aspekti.

¹⁹ En la areno.

unuope, kaj precipe al la presbiteroj, freŝigi la episkopon por la gloro de la Patro kaj de Jesuo Kristo kaj de la apostoloj. 3 Mi petas vin en amo aŭskulti min, ke mia letero ne fariĝu atesto kontraŭ vi. Kaj por mi preĝu ankaŭ vi, ĉar vian amon mi bezonas same kiel la kompaton de Dio, por fariĝi inda je la destino, kiun mi trafis, ke mi ne montriĝu forĵetita.

13:1 Salutas vin la amo de la Smirnanoj kaj de la Efezanoj. Memoru en viaj preĝoj la eklezion <kiu estas> en Sirio, laŭ kiu mi ne meritas nomiĝi, estante la lasta el ili. 2 Saluton en Jesuo Kristo, vi, submetitaj al la episkopo kiel al la ordono <de Dio>, same kiel ankaŭ al la presbiteraro. Kaj ĉiu unuope vi amu vin reciproke kun koro nedividebla. 3 Oferas sin por vi mia spirito ne nur nun, sed ankaŭ, kiam Dion mi atingos. Ĉar ankoraŭ mi estas en danĝero: sed fidela estas la Patro en Jesuo Kristo por plenumi mian kaj vian petadon, en kiu vi montriĝu senriproĉaj.

La letero de Ignacio al la Romanoj

Επιστολή του Ιγνατίου προς Ρωμαίους

Saluton

Ignacio, ankaŭ nomata Teoforo²⁰, al la <eklezio> kiu ricevis kompaton en la grandiozeco de la Plejalta Patro kaj de Jesuo Kristo, lia sola Filo;

al la eklezio amata kaj lumigata de la volo de Tiu, kiu ĉion volas, kio estas laŭ la fido kaj amo de Jesuo Kristo, nia Dio;

<al la eklezio>, kiu prezidas en la ĉefurbo de la regiono de la Romanoj,

<la eklezio> inda je Dio, honorinda, inda nomiĝi feliĉa, inda esti laŭdata, inda ricevi ĉion deziratan, inda je ĉio sankta kaj prezidanta je la amo, nomata laŭ Kristo²¹, nomata laŭ la Patro;

<la eklezio>, kiun mi salutas en la nomo de Jesuo Kristo, Filo de la Patro:

al ĉiuj unuigitaj laŭ karno kaj spirito je ĉiuj liaj ordonoj, sendistinge plenigitaj je la graco de Dio kaj purigitaj de ĉiu fremda koloro,

mi deziras senriproĉe la plej grandan ĝojon en Jesuo Kristo, nia Dio.

²⁰ Laŭlitere: Di-portanto. Komparu kun la nomo Kristoforo – Krist-portanto.

²¹ Χριστόνομος ankaŭ povus signifi, ke Kristo estas ĝia leĝo.

Mi timas vian amon

1:1 Per preĝado al Dio mi ekhavis <la privilegion>, ke mi vidos viajn Diindajn vizaĝojn, tiel ke eĉ pli ol mi petis, mi ricevis; ĉar en katenoj pro Kristo Jesuo mi esperas brakumi vin, se almenaŭ vere estas la volo <de Dio>, ke mi fariĝos inda atingi la finon. **2** Ĉar la komenco estas bone metita, se la gracon mi atingos ekpreni senĝene mian sorton. Ĉar mi ja timas vian amon, ke ĝi nocu al mi. Ĉar estas facile por vi fari kion vi volas; sed por mi estas malfacile atingi Dion, se vi indulgas min.

Ne savu min el la martiriĝo

2:1 Ĉar mi ne volas agi al vi kiel iu plaĉa al la homoj, sed mi volas plaĉi al Dio, same kiel ankaŭ vi plaĉas al Li. Ĉar neniam mi havos tian eblon atingi Dion, kaj ankaŭ vi, se vi silentos, neniam povos subskribi pli bonan faron. Ĉar se vi restos silentaj koncerne min, mi iĝos parolo de Dio; sed se vian amon laŭ la karno vi montros, mi ree estos homa voĉo. **2** Do ne serĉu por mi ion pli bonan ol ke mi estu ofero al Dio, dum la altaro ankoraŭ pretas; ke, kunigite en amo, vi fariĝu ĥoro kaj kantu al la Patro en Jesuo Kristo, ke min, la episkopon de Sirio, Dio bonvolis venigi al la okcidento de la oriento. Estas bone, ke la suno de mia vivo subiru, por ke al Li mi ree leviĝu!

Prefere preĝu, ke mi atingu la martiriĝon

3:1 Neniam al iu ajn vi enviis; tion vi lernigis al aliaj. Nun mi deziras, ke tio estu konfirmita <per viaj agoj>, kion al aliaj vi instruas. **2** Nur forton vi petu por mi, interne kaj ekstere, por ke mi ne nur diru sed ankaŭ volu, tiel ke ne nur kristano mi nomiĝu, sed ankaŭ pruviĝu esti tia. Ĉar se mi pruviĝas tia, mi ankaŭ povas nomiĝi tia, kaj tiam esti fidela, kiam por la mondo mi ne plu ŝajnos esti tia. **3** Ĉar nenio, kio ŝajnas, estas bona. Nia Dio Jesuo Kristo, estante en la Patro, des pli ŝajnas tia. Ne rezulto de konvinka parolado, sed de spirita grandeco estas la kristaneco, kiun malamas la mondo.

Lasu min fariĝi predo por la bestoj

4:1 Mi skribas al ĉiuj eklezioj kaj mi ordonas al ĉiuj, ke libervole mi mortas pro Dio, se vi tion almenaŭ ne malhelpos. Mi petas vin, ke via bonvolemo al mi ne fariĝu embarasa. Lasu min fariĝi predo por la bestoj, ĉar per ili eblas al mi atingi Dion. Manĝaĵo mi estas de Dio kaj per la dentoj de la sovaĝaj bestoj mi mueliĝos, por ke mi pruviĝu pura pano de Kristo. 2 Prefere logu la sovaĝajn bestojn, ke ili fariĝu tombo por mi, kaj ke nenion el mia korpo ili restigu, tiel ke endormiĝinte mi por neniu fariĝu peza. Tiam vera lerninto mi estos de Jesuo Kristo, kiam la mondo ne plu vidos mian korpon. Petegu la Kriston pri mi, ke per ĉi organoj mi fariĝu ofero al Dio. 3 Ne kiel Petro kaj Paŭlo mi ordonas al vi. Apostoloj ili estis, mi kondamnito; liberaj ili estis, sed mi ĝis nun sklavo. Se se mi suferos, mi estos liberigito de Jesuo Kristo kaj mi releviĝos en li libera. Kaj nun, katenito, mi lernas deziri nenion.

Ligita al dek leopardoj

5:1 De Sirio ĝis Romo mi batalas kun sovaĝaj bestoj, surtere kaj surmare, nokte kaj tage, ĉar mi estas ligita al dek leopardoj, t. e. al grupeto da soldatoj, kiuj, eĉ se bonfarataj, montras sin fiaj. Sed en tiu malbonagado mi bone lernas, tamen mi ne estas pro tio pravigita. 2 Ho, ke mi ĝuu la sovaĝajn bestojn, kiuj estas preparitaj por mi! kaj mi preĝas, ke ili montriĝu rapidaj pri mi; mi invitas ilin rapide formanĝi min, ne trakti min kvazaŭ timeme ili ne ektuŝis min. kaj se ili ne volonte deziras, mi devigos ilin. 3 Pardonu min; mi scias, ke estas por mia bono. Mi nun komencas esti vera lernanto. Nenio videbla aŭ nevidebla ĵaluzu al mi, ĉar mi atingos Jesuon Kriston! Ke fajro kaj kruco, ke amaso da sovaĝaj bestoj, ke dispecado de l' ostoj, kontuzoj de l' membroj, ke maĉado de mia tuta korpo, ja ke teruraj tormentoj de la diablo venu sur min, – se nur Jesuon Kriston mi atingu!

Tra la morto la veran vivon mi atingos

6:1 Neniom mi profitos de la kulminoj de la mondo, nek de la reĝlandoj de ĉi tempo. Pli bele estas por mi morti pro Jesuo Kristo, ol reĝi la kulminojn de la tero. Tiun mi deziras, kiu mortis pro ni: tiun mi volas,

tiun kiu pro ni resurektis. Tio estas la gajno, kiu pretas por mi. 2 Pardonu min, fratoj: ne malhelpu min vivi, ne deziru, ke mi estu morta, ne donacu min, kiu volas aparteni al Dio, al la mondo, kaj ne trompu min per la materio. Lasu min ĝui la puran lumon; kiam tien mi alvenos, mi estos vera homo. 3 Lasu min imitadi la pasionon de mia Dio. Se iu havas Lin en si mem, tiu konsideru, kion mi volas, kaj li havu simpatian kun mi, sciante pelas min.

Kial mi volas krucumiĝi

7:1 La princo de ĉi tiu mondo volis forrabi min kaj neniigi mian sintenon rilate Dion. Neniu do el vi, kiuj ĉeestas <tie en Romo>, helpu lin; prefere vi flanku ĉe mi, t.e. ĉe Dio. Vi ne parolas Jesuon Kriston, sed vi deziras ĉi mondon. 2 Ĵaluzo ne havu lokon inter vi. Eĉ se mi ĉeeste ordonus vin <je la malo>, vi tamen obeu min; en ĉi tio prefere vi obeu al kion mi skribas. Viva mi ja skribas, sed dezira morti. Mia amo estis krucumita, kaj en mi ne estas fajro, kiu deziras nutraĵon; sed akvo vivanta kaj parolanta en mi, kiu diras al mi interne: Ek, tien – al la Patro! 3 Mi ne plu ĝuas pereeman nutraĵon nek la plezurojn de ĉi tiu vivo. Panon de Dio mi volas, t.e. la karnon de Jesuo Kristo, kiu estas el la semo de David, kaj kiel trinkaĵon mi volas lian sangon, t.e. lian nepereeman amon.

Mi ne volas vivi laŭ la homoj

8:1 Mi ne plu volas vivi laŭ la homoj. Kaj tio realiĝos, se vi bonvole volas. Konsentu do, por ke ankaŭ viaj deziroj plenumiĝu. 2 Per malmulte da vortoj mi petas vin: fidu min. Jesuo Kristo malkaŝos al vi, ke la veron mi diras: tiu senmensoga buŝo, per kiu la Patro vere parolis. 3 Petu por mi, ke mi atingu la celon. Ne laŭ la karno mi skribas al vi, sed laŭ la menso de Dio. Se mi suferos, vi bone deziris por mi. Sed se mi estos repuŝita, vi malamis min.

Preĝu por la eklezio en Sirio

9:1 Memoru en viaj preĝoj pri la eklezio en Sirio, kiu nun anstataŭ min havas Dion kiel sian paŝtiston. Nur Jesuo Kristo superrigardas ĝin, same kiel via amo. 2 Mi hontas, esti kalkulita kiel unu el ili, ĉar mi ne estas

inda, estante la plej lasta el ili, kvazaŭ misnaskito. Sed gracon mi ricevis esti iu, se Dion mi atingos. 3 Salutas vin mia spirito kaj la amo de la eklezioj, kiuj akceptis min en la nomo de Jesuo Kristo, ne kiel nuran pasanton. Sed ankaŭ tiuj eklezioj, kiuj ne povis saluti min dumvoje, ĉe tiu vojo de la korpo, antaŭiris min urbo post urbo.

Fino

10:1 Ĉion ĉi mi skribas al vi el Smirno, pere de Efezanoj, kiuj meritas esti plej benataj. Kun mi estas interalie ankaŭ Kroko, kiun mi kore amas. 2 Koncerne tiujn, kiuj antaŭ mi iris el Sirio al Romo por glori Dion, mi fidas, ke vi ilin konas; sciigu ilin, ke mi estas nun apude. Ĉar ĉiuj ili estas indaj je Dio kaj je vi: estas juste, ke en ĉio vi refreŝigu ilin. 3 La dato de tiu ĉi letero estas la naŭa tago antaŭ la kalendoj de septembro²². Saluton fine en la pacienco de Jesuo Kristo.

²² la 23a de aŭgusto.

La letero de Ignacio al la Filadelfianoj

Επιστολή του Ιγνατίου προς Φιλαδελφείς

Saluton

Ignacio, ankaŭ nomata Teoforo²³,

al la eklezio de Dio la Patro kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo, kiu estas en Filadelfio en Azio,

<al la eklezio>, kiu ricevis la gracon kaj estis fondita en la harmonio de Dio kaj kiu senĉese ĝojas en la pasiono de nia Sinjoro, kaj kiu estas tute plenigita per dankemo je lia resurekto:

<tiun eklezion> mi salutas en la sango de Jesuo Kristo, kiu estas nia eterna kaj daŭra ĝojo, precipe se ili estas unu kun la episkopo kaj kun la presbiteroj sub li kaj la diakonoj, kiuj estis ordinitaj laŭ la menso de Jesuo Kristo, kiujn li laŭ sia propra volo starigis por garantion, en sia sankta spirito.

Laŭdo pri la episkopo

1:1 Tiu episkopo, mi scias, ricevis tiun servon²⁴ ne el si mem nek de homoj²⁵, por komuna bono <de la eklezio>, ne pro aroganteco, sed en

²³ Laŭlitere: Di-portanto. Komparu kun la nomo Kristoforo – Krist-portanto.

²⁴ Laŭlitere: tiun diakonecon.

²⁵ Komparu kun Galatoj 1:1.

amo de Dio la Patro kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo; mirfrapita mi estas pro lia sereneco, ĉar silentante li pli kapablas atingi ol tiuj, kiuj parolas vane. 2 Ĉar li estas en harmonio kun la ordonoj <de Dio>, same kiel la kordoj al la citro. Tial mia animo laŭdas lian menson kiel direktitan al Dio, sciante ke ĝi estas virta kaj perfekta, kaj ke lia senperturbo kaj lia interna kvieteco estas laŭ la ekzemplo de l' senfina sereneco de la vivanta Dio.

Infanoj de la lumo

2:1 Kiel infanoj de la lumo kaj de la vero, vi fuĝu skismojn kaj aĉajn doktrinojn; sed kie estas la paŝtisto, tie kiel ŝafoj vi sekvu. 2 Ĉar multaj lupoj nefidindaj kun aĉa plezuro forkaptas la homojn, kiuj kuras al Dio; sed en via unueco ili ne havos lokon.

Evitu skismojn

3:1 Tenu vin for de la malbonaj plantoj, kiujn Jesuo Kristo ne prizorgas, ĉar ili ne estas plantaĵo de la Patro; ne, ke inter vi mi trovis skismon, sed foje ja diskreskaĵojn. 2 Ĉar kiuj estas de Dio kaj de Jesuo Kristo, tiuj estas kun la episkopo kaj kiuj konvertiĝos kaj reiros en la unuecon de la eklezio, ankaŭ tiuj estos de Dio, por vivi laŭ Jesuo Kristo. 3 Ne trompiĝu, miaj fratoj: se iu aliĝas al skismo, li ne heredos la regnon de Dio; ĉar ja, se iu promenas en aliula doktrino, tiu ne kun-konfesas la pasionon <de Kristo>.

La eŭĥaristio, centro de unueco

4:1 Atentu do, ke vi havu unu eŭĥaristion; ĉar unu estis la karno de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kaj unu pokalo por unuiĝo en lia sango, kaj unu altaro, same kiel unu episkopo kune kun la presbiteraro kaj la diakonoj, miaj kunsklavoj; por ke, kion vi faras, vi faru laŭ Dio.

Tamen mi ne estas perfekta

5:1 Miaj fratoj, mi elŝutas min mem en amo al vi; ekstreme ĝojante pri vi, mi sekurigas vin; sed nu – ne mi, sed Jesuo Kristo; kiel katenito pro li, mi timas pli, ĉar mi ankoraŭ ne estas perfekta; sed nia preĝo al Dio

perfektigos min, por ke mi ekhavu la porcion, kiun per graco mi alvenis, dum mi fuĝas al la evangelio kiel al la karno de Jesuo, kaj al la apostoloj kiel al la presbiteraro de la eklezio. 2 Ni ankaŭ amu la profetojn, ĉar ankaŭ tiuj mesaĝis la evangelion, kaj metis sian esperon je li, kaj atendis lin; ili fidis je li kaj saviĝis, ĉar ili estis en unueco kun Jesuo Kristo; ili estis sanktuloj, indaj je amo kaj je admiro: Jesuo Kristo atestis pri ili; ili estis kunkalkulitaj en la evangelio de la komuna espero.

Ne akceptu Judismon

6:1 Sed se iu venas al vi kun klarigadoj pri Judismo, ne aŭkultu ilin. Ĉar estas pli bone aŭdi pri kristanismo de viro cirkumcidita, ol pri Judismo de necirkumcidito. Sed se ambaŭ ne parolas pri Jesuo Kristo, miaopinie ili estas kvazaŭ steleoj aŭ tomboj por mortintoj, sur kiuj staras nur la nomoj de homoj.

2 Vi fuĝu do la fiajn planojn kaj ruzojn de la princo de ĉi tiu mondo, por ke vi ne fariĝu malpli fortaj en la amo. Sed estu unuanimaj kun koro nedividita.

3 Kiom koncernas min, mi dankas al Dio, ke mi havas bonan konsciencan kaj neniun, nek kaŝe nek publike, povas aserti, ke mi estis ŝarĝo por li, en io eta aŭ io granda. Kaj pri ĉiuj, kun kiuj mi parolis, mi preĝas, ke tion li ne faru plendkialo kontraŭ si.

Mi instigis vin al unueco

7:1 Ĉar se kelkaj laŭ la karno volis erarigi min, la spirito, estante el Dio, ne estas trompata. Ĉar ĝi scias, de kie ĝi venis, kaj kien ĝi iras, kaj malkaŝas la sekretojn. Mi ja kriis inter vi, mi diris fortavoĉe, per voĉo de Dio: Atenton al la episkopo, kaj al la presbiteraro kaj al la diakonoj!

2 Kelkaj supozis, ke tion mi diris, ĉar mi antaŭsciis la skismon de kelkaj inter vi. Sed Dio estu mia atestanto, pro kiu mi portas katenojn, ke tion mi ne sciis de homa karno. Sed la spirito proklamis tion dirante: Ekster via episkopo vi faru nenion! Vian karnon gardu kiel la templon de Dio, amu la unuecon, la skismojn vi fuĝu, fariĝu imitantoj de Jesuo Kristo, same kiel li mem estas tiu de la Patro.

«Por mi ĉio malnova estas Jesuo Kristo»

8:1 Mi do faris la mian kiel homo preta al unueco. Ĉar kie estas skismo kaj kverelo, tie Dio ne loĝas. Al ĉiuj, kiuj pentemas, la Sinjoro pardonas, se ili reiras penteme al la unueco kun Dio kaj la sindrio de l' episkopo. Mi fidas je la graco de Jesuo Kristo, kiu liberigos vin de ĉiu kateno.

2 Mi alvokas vin, fari nenion el ribelemo, sed nur laŭ la instruo de Kristo. Kiam mi aŭdis kelkajn diri: Se mi ne trovas ĝin en la malnovaj skriboj, mi ne fidas je la evangelio; sed kiam mi diris al ili: Estas skribite, ili respondis al mi: Tio pruvotas. Sed por mi ĉio malnova estas Jesuo Kristo, la senmakula malnovaĵo estas lia kruco, liaj morto kaj resurekto, la fido kiu venas de li, kaj en tiuj mi deziras kun via preĝo saviĝi.

La Malnova Skribo estas bona, sed la Nova pli bona

9:1 La pastroj, certe, estas bonaj, sed pli bona la Ĉefpastro, al kiu estas konfidita la plejsankta el la sanktaĵoj, al kiu sola estas konfiditaj la sekretoj de Dio. Li estas la pordo al la Patro, tra kiu eniras Abraham, Isaak kaj Jakob kaj la profetoj, kaj la apostoloj, kaj la eklezio. Ĉio ĉi direktiĝas al la unueco de Dio.

2 Sed la evangelio havas ion plian: la aperon de la savanto, nia Sinjoro Jesuo Kristo, lian Pasionon kaj lian resurekton. Ĉar la amataj profetoj anoncis pri li, sed la evangelio estas kompletigo de senmorteco. Ĉio ĉi kune estas bona, se en amo vi fidas.

Gratuloj al la Antioĥianoj pro la fino de la persekuto

10:1 Ĉar, dank' al via preĝo, kaj pro la kompato, kiun en Kristo Jesuo vi havas, mi sciiĝis, ke la eklezio en Antioĥio de Sirio estas en paco, kaj decas por vi kiel eklezio de Dio, ke vi elektu diakonon por tie agi kiel lia reprezentanto, por kunĝoji kun ili kiam ili kunvenas kaj glori lian nomon. 2 Feliĉa li estas en Jesuo Kristo, kiu estos juĝita inda je tia servado, kaj ankaŭ vi estos laŭdata. Se vi deziras, ne estos ekster via kapablo, pro la nomo de Dio, kiel ankaŭ la proksimaj eklezioj jam sendis, foje episkopojn, foje presbiterojn kaj diaconojn.

Dankon kaj salutojn

11:1 Nun, pri Filono, la diakono el Kilikio, viro tre atestata, kiu ĉiam ankoraŭ servas kun mi la parolon de Dio, kune kun Reo Agatopodo, viro eminenta, kiu el Sirio sekvis min, sen atenti sian vivon: – Ili ambaŭ atestas pri vi; kaj mi mem dankas al Dio pro vi, ke ilin vi akceptis, same kiel la Sinjoro vin. Sed tiuj, kiuj malhonoris ilin, estu pardonitaj en la graco de Jesuo Kristo. 2 Salutas vin la amo de la fratoj en Troado, de kie mi ankaŭ skribas al vi pere de Buro, kiu same kiel mi estis sendita de la Efezanoj kaj Smirnanoj por saluti vin. Honoru ilin la Sinjoro Jesuo Kristo, je kiu ili esperas en karno, spirito, animo, fido, amo kaj unueco. Saluton en Kristo Jesuo, nia komuna espero.

La letero de Ignacio al la Smirnanoj

Επιστολή του Ιγνατίου προς Σμυρναίους

Saluton

Ignacio, ankaŭ nomata Teoforo²⁶,
al la eklezio de Dio la Patro kaj de lia amata Jesuo Kristo,
kiu atingis mizerikordon laŭ la tuta dono de la graco,
plena je fido kaj amo, kaj sen ke mankis je ajna karismo;
al eklezio plej Di-inda kaj plej sanktec-porta, kiu troviĝas en Smirno de
Azio,
en senriproĉa spirito kaj parolo de Dio.

Laŭdo de l' adresito; kredkonfeso

1:1 Mi laŭdas Jesuon Kriston, la Dion, kiu tiel saĝigis vin; ĉar mi observis, ke vi perfektigis en neskuebla fido, kvazaŭ vi estus najlitaj sur la kruco de nia sinjoro Jesuo Kristo, same karne kiel spirite, kaj fiksita en amo per la sango de Kristo, estante plene konvinkita pri nia sinjoro, ke li vere estas el la semo de David laŭ la karno, filo de Dio laŭ deziro kaj povo de Dio, vere naskita el virgulino, baptita de Johano, por ke plenumiĝu ĉiu justeco pere de li. 2 Laŭvere, fine li estis krucumita sub Pontio Pilato kaj la tetrarĥo Herodo – de kies frukto ni diras, ke lia Dia kaj beata suferado – por levi la flagon de ĉiuj jarcentoj, per sia resurekto,

²⁶ Laŭlitere: Di-portanto. Komparu kun la nomo Kristoforo – Krist-portanto.

inter siaj sanktaj fiduloj, jen la Judoj, jen la paganoj, unuigitaj en unu korpon en lia Eklezio.

La Docketistoj

2:1 Ĉion ĉi la Sinjoro reale suferis pro ni, por ke ni reale estu savitaj. Kaj li reale suferis, same kiel li ankaŭ reale resurektis, ne, kiel kelkaj nekredantoj asertas, ke li nur ŝajnis suferi, same kiel ili mem nur ŝajnas esti kristantoj. Kaj kiel ili kredas, tiel same okazos al ili, same senkorpaj kaj same malbonspiritaj.

Kristo post la resurekto posedis korpon.

3:1 Ĉar mi scias, ke post la resurekto li ankoraŭ estis en la karno kaj mi kredas, ke ankoraŭ li estas. 2 Kaj kiam li venis al tiuj ĉirkaŭ Petro, li diris al ili: Prenu, palpu min, kaj vidu, ke mi ne estas senkorpa spirito. Kaj tuj ili tuŝis lin kaj ili kredis, estante konvinkitaj de lia karno kaj lia spirito. Pro tiu kialo ili malestimis la morton, kaj ili montriĝis stari super la morto. 3 Post la resurekto li manĝis kaj trinkis kun ili kvazaŭ li havus korpon, kvankam spirite li estis unuigita kun la Patro.

Atentu pri tiuj herezuloj

4:1 Mi donas al vi ĉi tiujn konsilojn, karuloj, sciante, ke ankaŭ vi tiel opinias. Sed mi gardas vin anticipe kontraŭ tiaj bestoj en homa formo, kiujn vi ne nur ne devas akcepti inter vi, sed se eble eĉ ne renkonti; sed vi nur preĝu por ili al Dio, se iel ili povas esti konvertitaj, kio tamen estos tre malfacila. Tamen Jesuo Kristo, nia vera vivo, havas la povon realigiti tion ĉi. 2 Sed se ĉi tiuj aferoj estus realigitaj de nia Sinjoro nur laŭŝajne, tiam ankaŭ mi nur laŭŝajne estus ligita. Sed se ĉi tiuj aferoj estus faritaj de nia Sinjoro nur laŭŝajne, tiam ankaŭ mi estus nur laŭŝajne ligita. Sed kial mi transdonis min al la morto, al la fajro, al la glavo, al sovaĝaj bestoj? Sed kiu estas proksima al la glavo, estas ankaŭ proksima al Dio. Kiu estas inter la sovaĝaj bestoj, estas en apudeco de Dio – almenaŭ se en la nomo de Jesuo Kristo. Por suferi kun li, ĉion ĉi mi eltenas; ĉar li fortigas min, fariĝinte perfekta homo.

Ilij danĝeraj eraroj

5:1 Tiun kelkaj sencie ignoras, – aŭ pliĝuste ili estas ignorataj de li, ĉar ili defendas la morton pli ol la veron: kiujn nek konvinkis la profetoj nek la leĝo de Moseo, nek eĉ ĝis nun la evangelio, nek eĉ niaj unuopaj suferoj. 2 Ĉar pri ni la samon ili pensas. Ĉar kiom profitigas min iu, se li laŭdas min, sed blasfemas mian Sinjoron, ne konfesante ke vere karnon li havis? Sed kiu tion ne rekonas, efektive neis lin, ĉar kadavron li portas. 3 Ilijajn nomojn, ĉar ili estas senfidaj, mi ne kredis notindaj. Sed mi ne menciis pri ili ĝis ili ekpentos kaj revenos al tiu sufero, kiu estas nia resurekto.

Nekredantoj pri la sango de Kristo estos kondamnitaj

6:1 Neniu trompu sin mem. Kaj ĉio enĉiela kaj la gloro de l' anĝeloj kaj la regantoj videblaj kaj nevideblaj, se ili ne fidas je la sango de Kristo, estos sub la juĝo. Kiu komprenas, komprenu. Neniu <alta> loko plenklovu vin; ĉar kio ĉion valoras, tio estas la fido kaj la amo, ol kio nenio estas preferinda. 2 Sed konsideru ĝuste tiujn, kiuj malsamopiniis pri la graco de Kristo, kiu venis al ni, kiel kontraŭaj ili estas al la volo de Dio. Pri amo ili ne zorgas, nek pri la vidvino, nek pri la orfo, nek pri la subprematoj, nek pri la katenito nek pri la liberigito; nek pri la malsatantoj aŭ la soifantoj.

Ni detenu nin de tiaj herezuloj

7:1 De eŭĥaristio kaj preĝado ili detenas sin, ĉar ili ne konfesas, ke la eŭĥaristio estas la karno de nia savanto Jesuo Kristo, kiu suferis pro niaj pekoj, kaj kiun la Patro, en sia boneco, resurektigis. Kiuj parolas kontraŭ ĉi tiu dono de Dio, mortas meze de sia disputado. Sed estus pli bone por ili celebri la eŭĥaristion, por ke ili resurektu! 2 Estas do dece, deteni sin de tiaj personoj kaj nek private paroli pri ili nek publike, sed atenti pri la profetoj, kaj super ĉio pri la evangelio, en kiu la sufero de Kristo diskoniĝis al ni kaj lia resurekto. Sed ĉiujn dividiĝojn vi evitu, ĉar tio estas la komenco de la malbono.

Nenio estu farita sen la episkopo!

8:1 Ĉiuj vi sekvu la episkopon, kiel Jesuo Kristo la Patron, kaj la presbiterojn kiel la apostolojn; kaj la diakonojn vi honoru kvazaŭ estus ordono de Dio. Neniu faru ion koncerne la eklezion sen la episkopo. Tio estu konsiderata ĝusta eŭĥaristio, kio estas farata de la episkopo aŭ de iu, al kiu li tion konfidis. 2 Kie ajn aperos la episkopo, tie estu ankaŭ la amaso de la popolo, same kiel, kie estas Jesuo Kristo, tie ankaŭ estu la katolika eklezio. Sen la episkopo ne estas laŭleĝe, nek bapti nek celebri la amo-manĝon; sed kion ajn li aprobas, tio ankaŭ plaĉas al Dio, tiel ke facile estos sekura kaj valida ĉio, kion vi faras.

Honoru la episkopon

9:1 Estas krome prudente ke ni resobriĝu, kaj ke, dum estas tempo, ni konvertiĝu al Dio. Estas bone honori kaj Dion kaj la episkopon. Kiu honoras la episkopon, tiu estas honorata de Dio; kiu ion faras kaŝe por la episkopo, tiu adoras la diablon. 2 Ĉio do abundu al vi per la graco; ĉar vi estas indaj. En ĉio vi refreŝigis min, kaj vin Jesuo Kristo. Malĉeestan kaj ĉeestan min vi amis. Dio rekompencu vin, ĉar lin vi atingos, se ĉion vi eltenas pro amo al li.

Rekono de ilia afableco

10:1 Bone vi faris, bonvenigante Filonon kaj Reon Agatopon kiel diakonojn de Kristo nia Dio; ili sekvis min pro la parolo de Dio; kaj ili same dankas la Sinjoron pro vi, ĉar vi refreŝigis ilin ĉiumaniere. Nenio el tio pereos por vi. 2 Mia spirito estu elaceta mono por vi, kaj same miaj ligoj, kiujn vi ne malŝatas kaj pri kiuj vi ne hontas. Pri vi ankaŭ ne hontos nia perfekta espero, Jesuo Kristo.

Peto sendi mesaĝon al Antioĥio de Sirio

11:1 Via preĝo atingis la eklezion en Antioĥio de Sirio. Venante de tiu loko, ligita en katenoj plej akcepteblaj al Dio, mi salutas ĉiujn, mi, kiu ne estas inda kalkuliĝi inter ili, ĉar mi estas la plej lasta inter ili; tamen, laŭ Dia volo mi kalkuliĝis inda, ne pro meritoj konsciaj, sed pro nura graco

de Dio, kiun mi preĝas perfekte ricevi, por ke tra via preĝado mi alvenu al Dio. 2 Por ke do via laboro estu kompleta, same surtere kiel enĉiele, decas, ke je la honoro de Dio via eklezio elektu iun indan reprezentanton, por ke tiu, vojaĝante al Sirio, gratulu ilin, ke ili nun estas en paco, kaj ke ili revenis en la propran grandecon, kaj ke ilia propreco estas restarigita inter ili. 3 Al mi do ŝajnas afero inda je Dio sendi iun el vi kun letero, por ke li kunĝoju la pacon, kiu laŭ la volo de Dio estiĝis al ili, kaj ke per viaj preĝoj li nun atingis la havenon. Estante perfektaj, vi ankaŭ celu tion, kio estas perfekta. Ĉar se vi celas fari la bonon, Dio pretas helpi vin.

Saluto

12:1 Salutas vin la amo de la fratoj en Troado, de kie mi ankaŭ skribas al vi pere de Buro, kiun vi kunsendis kun mi kune kun la Efezanoj, viaj fratoj, kaj kiu en ĉiu rilato refreŝigis min. Kaj mi volus, ke ĉiuj imitu lin, ĉar li estas ekzempla diakono de Dio. La graco ĉiel rekompencu lin. 2 Mi salutas vian plej Di-indan episkopon kaj vian Di-decan presbiteraron kaj la diakonojn, miajn kunsklavojn, kaj ĉiujn vin unuope kaj kune en la nomo de Jesuo Kristo kaj en lia karno kaj sango, en la pasiono kaj resurekto korpa kaj spirita, en unueco kun Dio kaj kun vi. Graco, kompatato, paco, pacienco al vi en ĉio!

Konkludo

13:1 Mi salutas la familiojn de la fratoj, kun iliaj edzinoj kaj infanoj, kaj la virgulinojn. kiuj nomiĝas vidvinoj. Estu fortaj en la forto de la Patro. Salutas vin Filono, kiu estas kun mi. 2 Mi salutas la domon de Taviaso, pri kiu mi preĝas, ke ĝi konstruiĝu en fido kaj amo, korpe kaj spirite. Mi salutas Alkan, mian plej amatan, kaj la nekompareblan Dafnon, kaj Eŭteknon kaj ĉiujn unuope. Saluton en la amo de Dio!

La letero de Ignacio al Polikarpo

Επιστολή του Ιγνατίου προς Πολύκαρπον

Saluton

Ignacio, ankaŭ nomata Teoforo²⁷, al Polikarpo, episkopo de la eklezio de la Smirnanoj, aŭ pli bone: kiu estis sub episkopado de Dio la Patro kaj la Sinjoro Jesuo Kristo, saluton al vi.

Pastoreca vivprogramo

1:1 Laŭdante vian certecon en Dio, kvazaŭ sur neskuebla roko, mi vin gloras, ĉar mi estis konsiderata inda je via sendifekta vizaĝo, kiun mi ĝojas en Dio. 2 Mi vin petas, je la graco, per kiu vi estas vestita, plirapidigi vian vojon kaj peti ĉiujn, ke ili saviĝu. Retenu vian pozicion kun ĉiu zorgemo, karna kaj spirita; atentu pri la unueco, ĉar nenio estas pli grava. Ĉiujn eltenu, ĉar la Sinjoro ankaŭ vin eltenis; ĉiujn eltenu en la amo, kiel vi ankaŭ ja faras. 3 Dediĉu vin daŭre al preĝado; petu pli bonan komprenon ol vi jam havas: estu atenta kun via sendorma spirito. Al ĉiu homo unuope vi parolu, kiel Dio donas al vi. Portu ĉies malforton, kvazaŭ perfekta atleto: kie grandas la penado, pli grandas la gajno.

²⁷ Laŭlitere: Di-portanto. Komparu kun la nomo Kristoforo – Krist-portanto.

Prudenta kiel la serpento

2:1 Se la bonajn disĉiplojn vi amas, tiurilate nenio estas via merito; sed prefere serĉu per malforto submeti la pli ĝenajn. Ne ĉiu vundo estas sanigita per la sama plastro. La paroksismojn kalmigu per softaj aplikoj. 2 Fariĝu en ĉio prudenta kiel la serpento kaj senkulpa kiel la kolombo. Ĉar pro tio ĉi vi estas karna kaj spirita, por ke vi ame rilatu al ambaŭ, kiuj prezentas sin videble antaŭ vi. La nevideblaĵoj – petu Dion, ke li malkaŝu ilin al vi, por ke nenio manku al vi, sed ke abunde vi ricevu tiujn donaĵojn. 3 La tempo vin vokas, kiel pilotoj la ventojn, kaj kiel ŝtormopelatoj serĉas la havenon, por ke vi atingu Dion. Estu sobra kiel atleto de Dio; la premio starigita por vi estas senmorteco kaj eterna vivo, pri kio vi ja estas konvinkita. En ĉio mi estas via elaĉetpago, miaj katanoj, kiujn vi amas.

Kiel amboso batata

3:1 Homoj, kiuj ŝajnigas sin indaj je kredo sed instruas doktrinojn fremdajn al la fido, ne timigu vin. Firme vi staru, kiel amboso batata. Karakterizas la mirindan atleton senhaŭtiĝi sed venki. Speciale ni ĉion eltenu pro Dio, por ke Li ankaŭ eltenu nin. 2 Ĉiam fariĝu pli mirinda ol vi jam estas. Atente elprovu la tempon. Atentu pri Li, kiu estas super la tempo, la sentempan, la nevideblan, la pro ni videblan, la nepalpeblan, la sensuferan, la pro ni suferkapablan, la pro ni ĉiumaniere suferintan.

Nenio okazu sen via scio; nenion vi faru sen scio de Dio

4:1 Vidvinoj ne neglektiĝu; krom la Sinjoro vi estu ilia protektanto. Nenio okazu sen via scio, nenion vi faru sen Dio, kion efektive vi ne faras: staru firme! 2 Ofte okazu viaj kunvenoj; laŭnome ĉiujn vi serĉu. 3 Nek viran nek inan sklavon vi traktu fiere; sed ili ankaŭ ne pufiĝu, sed je laŭdo de Dio ili des pli submetiĝu, por ke pli bonan liberon de Dio ili ricevu. Ili ne deziru esti liberigitaj je publikaj kostoj, por ke ili ne montriĝu sklavoj de sia propra deziro.

La devoj de edzoj kaj edzinoj

5:1 Fuĝu la malbonajn agojn; sed prefere faru predikon kontraŭ ili. Al miaj fratinoj faru predikon, ke ili amu la Sinjoron kaj ke ili estu korpe kaj spirite kontentaj pri siaj vivkunuloj. Same ankaŭ al la fratoj ordonu en la nomo de Jesuo Kristo, ami siajn vivkunulojn kiel la Sinjoro sian eklezion. 2 Se iu ajn kapablas resti en la sama pureco je honoro de la karno de la Sinjoro, li restu tia sen fanfaronado. Sed se li komencas fanfaroni, li perdiĝas, kaj se iu juĝas sin pli granda ol la episkopo, li ruiniĝas. Sed decas al kiuj edziĝas kaj al kiuj edziniĝas fari sian unuiĝon kun konsento de la episkopo, por ke la nupto estu laŭ la Sinjoro kaj ne laŭ la deziro. Ĉio okazu honore je Dio.

La devoj de la kristana brutaro

6:1 Atentu pri la episkopo, por ke ankaŭ Dio atentu pri vi. Mi oferas min por tiuj, kiuj submetas sin al la episkopo, al la presbiteroj, al la diakonoj; kaj mia porcio estu kune kun ili en Dio! Kunlaboru kun la ceteraj, kunluktu, kunkuru, kunsuferu, kundormu, kunvekiĝu kiel administrantoj, asistantoj kaj servantoj de Dio. 2 Plaĉu al Tiu, sub kiu vi luktas, de kiu ankaŭ la nutraĵojn vi ricevas; neniu el vi montriĝu dizertanto. Via bapto rolu kiel armiloj, via fido kiel kasko, via amo kiel lanco, via pacienco kiel tuta panoplio; viaj bonaj agoj estu via deponaĵo, por ke vi ricevu indan rekompencan. Pacienca do estu unu pri la alia en mildeco, kiel Dio pri ni. Mi ĝoju pri vi por ĉiam!

Peto, ke Polikarpo sendu iun al Antioĥio

7:1 Ĉar la eklezio de Antioĥio de Sirio estas en paco, kiel mi sciigis, dank' al via preĝado, ankaŭ mi fariĝis pli kuraĝa en senzorgeco je Dio, se almenaŭ per suferado mi atingu Dion, tiel ke per viaj preĝoj ĉe la resurekto mi troviĝu via disĉiplo. 2 Decas, ho Polikarpo, plej benata de Dio: kunigu konsilion plej indan je Dio, kaj elektu iun, kiun vi tre amas, kaj kiun vi konas kiel senhezitan, kaj kiun eblus nomi mesaĝisto de Dio; kaj ke donu al tiu la taskon, iri al Sirio, por glorigi vian senhetizan amon je la honoro de Dio. 3 Kristano ne havas potencon pri si mem, sed devas esti ĉiam preta por Dio. Tio estas laboro de Dio kaj de vi, kiam vi ĝin

kompletigas por Lia gloro. Ĉar mi konfidas je la graco, ke pretaj vi estas por ĉiu bona ago antaŭ Dio. Sciante do pri via energia amo por la vero, mi admonis vin per ĉi mallonga letero.

Ankaŭ la ceteraj eklezioj sendu iun al Antioĥio

8:1 Ĉar mi ne povis skribi al ĉiuj eklezioj, ĉar tiel subite mi devis fornavigi el Troado al Napolo, pro devigo de la volo²⁸, vi, kvazaŭ vi posedas la opinion de Dio, skribis al la eklezioj fore de Smirno, por ke ankaŭ ili faru la samon. Kiuj kapablis, sendis homojn piede, la ceteraj leterojn per la homoj, kiujn vi sendis, por ke tiel eternan gloron ili atingu, kiel decas. 2 Ĉiujn mi salutas laŭnome kaj la vidvinon de Epitropo kun ŝia tuta domo kaj ŝiaj infanoj. Mi salutas mian amatan Atalon. Mi salutas tiun, kiu estos opiniata inda vojaĝi al Sirio. Graco estu al li por ĉiam kaj al tiu, kiu al Polikarpo sendis lin. 3 Restu, mi petas vin, por ĉiam en nia Dio, Jesuo Kristo, restu en Li, en la unueco kaj vigilaro de Dio. Mi salutas Alkan, kiun mi tre amas. Saluton en la Sinjoro!

²⁸ De l' Sinjoro aŭ de l' imperiestro? neklare.

La martiriĝo de Ignacio

Μαρτυρολόγιο του Ιγνατίου

Ignacio deziras fariĝi martiro

1:1 Kiam Trajano ĵus transprenis la regadon pri la Romanoj²⁹, Ignacio, lernanto de la apostolo Johano, estis apostoleca viro en ĉiu aspekto kaj gvidis zorgeme la eklezion de Antioĥio, dum plej pene li eskapis la antaŭajn ŝtormojn estigitajn de la multaj persekutoj sub Domiciano. Kiel lerta stiristo, per la kasko de preĝo kaj fasto, per la seriozeco de sia instruado, kaj per spirita laboro li luktis kontraŭ la tempestoj, kiuj atakis lin, timante ke iun li perdos el tiuj, kiuj havas ne sufiĉe da kuraĝo aŭ kiuj povas suferi pro sia simpleco. 2 Tial li ĝojegis pri la transvila situacio de la eklezio, kiam kvietiĝis portempe la persekutado, sed persone li malĝojis, ke li ankoraŭ ne atingis la veran amon al Kristo, nek jam atingis la perfektecon de disĉiplo. Ĉar interne li pripensis, ke la konfeso, kiun formas la martiriĝo, portus lin en ankoraŭ pli intiman rilaton kun la Sinjoro. 3 Tial ankoraŭ kelkajn jarojn li daŭrigis pri la eklezio, kaj kvazaŭ Dia lampo prilumante ĉies komprenon pri la klarigado de la Skriboj, fine li atingis kion li deziris.

Ignacio kondamnita de Trajano

2:1 En la naŭa jaro de sia regado, Trajano sin plialtigis pro fiero post la venkoj, kiujn li akiris super Skitoj, Dakoj kaj multaj aliaj nacioj, kaj

²⁹ La stilo estas intence iom solena.

pensante, ke la religia korpuso de la kristanoj ankoraŭ estas bezonata por kompletigi la submeton de ĉio sub li, kaj tial minacante ilin per persekutado, krom se ili konsentos adori la demonojn, same kiel ĉiuj ceteraj nacioj, kaj li do pelis ĉiujn, kiuj vivis ditime, aŭ oferadi al la Dioj aŭ pereii.

2 La nobla soldato de Kristo <Ignacio> do, timante pri la eklezio de Antioĥio, konforme al sia propra deziro estis kondukita antaŭ Trajanon, kiu tiutempe estis en Antioĥio, sed estis en hasto por pluiiri al Armenio kaj al la Partoj.

3 Kiam li estis starigita antaŭ la imperiestro Trajano, tiu princo diris al li:

Kiu vi estas, vi eta demono, kiu daŭre rompas niajn ordonojn kaj instigas aliajn por fari la samon, por ke mizere ili pereu.

Ignacio diris:

Neniu rajtas nomi Teoforon malbona; ĉar ĉiuj demonoj foriris de la servantoj de Dio. Sed se, ĉar mi estas malamiko de ĉiuj demonoj, vi nomas min tia, mi konsentas. Ĉar Kriston, la Ĉielan Reĝon, mi havas kun mi, mi neniigas ĉiujn intencojn de la diablo.

4 Trajano diris:

Kaj kiu estas Teoforo?

Ignacio respondis:

Tiu, kiu havas Kriston en la brusto.

Trajano diris:

Ĉu vi do ne vidas, ke ni havas la Diojn en nia menso, kies helpon ni uzas en bataloj kontraŭ la malamikoj?

Ignacio diris:

Nomante la Demonojn de la paganoj Dioj, vi eraras. Ĉar estas nur unu Dio, kiu faris ĉielon kaj teron, la maron kaj ĉion, kio estas en ili³⁰; kaj unu Jesuo Kristo, Lia ununaskita Filo, kies amikecon mi ĝuas.

5 Trajano diris:

Vi ja celas la krucumiton sub Poncio Piloto?

Ignacio diris:

Tiun, kiu krucumis la pekon kune kun ĝia inventinto, kaj kiu kondamnis ĉiun demonan malbonon sub la piedoj de tiuj, kiuj portas ĝin en sia koro.

6 Trajano diris :

Ĉu vi do portas en vi la Kriston?

Ignacio diris:

Jes, ĉar estas skribite: Mi loĝos inter ili kaj mi iros inter ili³¹.

7 Trajano verdiktis jene:

Ni verdiktas, ke Ignacio, kiu konfesas ĉirkaŭporti en si la krucumiton, estu ligita de soldatoj kaj estu transportita al la granda urbo Romo, kie li estu manĝaĵo por la bestoj, por vido kaj ĝuo de la popolo.

8 Kiam la sankta martiro tiun verdikton aŭdis, kun ĝojo li ekkriis:

Mi dankas Vin, Sinjoro, ke Vi degnis honori min per perfekta amo al Vi, igante min esti ligita per feraj katenoj, same kiel Vi apostolo Paŭlo.

9 Tiel parolinte kun plezuro li ĉirkaŭtiris al si la ĉenojn, kaj unue preĝinte por la eklezio, kaj sub ploroj konfidinte ĝin al la Sinjoro, kvazaŭ distingita virŝafo de belega grego li estis forportita de sovaĝa kruelo de la soldatoj, por esti transportita al Romo, por tie havigi nutraĵan al la kruelaj bestoj.

³⁰ Psalmo 146:6.

³¹ 2 Korintanoj 6:16.

Ignacio persîpe al Smirno

3:1 Tial, kun granda entuziasmo kaj gaja, pro sia deziro suferi, el Antioĥio li venis al Sirio, kaj de tie li ekvelis. Kaj post multa suferado li alvenis en Smirnon, kie kun granda ĝojo li elŝipiĝis kaj hastis por vidi la sanktan Polikarpon, episkopon de Smirno sed antaŭe lian kundisĉiplon. Ĉar iam ili ambaŭ estis disĉiploj de la apostolo Johano. 2 Kondukite al li kaj komunikinte al li kelkajn spiritajn donojn kaj ĝojante pri siaj ĉenoj, li petis lin lukti kun li por plenumo de sia deziro, precipe komune kun la tuta eklezio (bonvenigis ja la sanktulon la urboj kaj eklezioj de Azio³² per siaj episkopoj kaj presbiteroj kaj diakonoj, kiuj ĉiuj alrapidis por saluti lin, se eventuale ili povus ricevi de li ian spiritan donon), sed antaŭ ĉio la sankta Polikarpo, por ke, per la sovaĝaj bestoj, li baldaŭ malaperu de ĉi tiu mondo, kaj manifestiĝu antaŭ la vizaĝo de Kristo.

Ignacio skribas al la eklezioj

4:1 Kaj tion do tiel li diris, kaj tiel li atestis, dissendante sian amon al Kristo kiel iu, kiu estas sekuriganta la ĉielon per sia bona konfeso, kaj per la seriozo de tiuj, kiuj kunigis siajn preĝojn al la liaj por la venonta batalo en la areno, kaj por doni rekompencan al la eklezioj, kiuj venis saluti lin per siaj gvidantoj, sendante leterojn plenajn je danko, kiuj verŝis spiritan gracon kune kun preĝoj kaj admono. 2 Vidante do ĉiujn kun plena afablo al li, kaj timante, ke la amo de ilia frateco povus ĝeni lian fervoron por la Sinjoro, dum bela pordo al martiriĝo por li malfermiĝis, li skribis al la eklezio de Romo la leteron, kiun ĉi tie mi aldonas³³.

Ignacio transportita al Romo

5:1 Preparinte do, kiel li deziris, per tiu ĉi letero la fratojn en Romo, kiuj estis malemaj <pri lia martiriĝo>, kaj eknavigante el Smirno (ĉar Kristoforo estis urĝita de la soldatoj rapidi al la publikaj spektakloj en la granda urbo de la Romanoj, por ke, metite antaŭ la sovaĝajn bestojn sub

³² Regiono en nuna Turkujo.

³³ Vidu sialoke.

la vido de la Romanoj, li akiru la kronon, je kiu li strebis) li elŝipiĝis en Troado. 2 Tiam, pluveturante de tie al Napolo, piede li pluiris al Filipi tra Macedonio, kaj plu al tiu parto de Epiro, kiu estas apud Epidamno; trovinte ŝipon en unu el la maraj havenoj, li pluelis al la Adriatika Maro, kaj de tie enirinte en la Tirenan Maron, la plurajn insulojn kaj urbojn li pasis ĝis, kiam Puteolo fariĝis videbla, li volonte deŝipiĝos, volante paŝi la piedsignojn de la apostolo Paŭlo³⁴. 3 Sed fortega vento ekblovis kaj malebligis al ili tion fari, dum la ŝipo rapide antaŭen bloviĝis; kaj, simple esprimante sian plezuro pri la amo de la fratoj en tiu loko, li velis plu. 4 Tial, ĝuante prosperan venton, en unu tago kaj nokto kontraŭvole ni rapidis plu, plorante pro la baldaŭa foriro de ni de tiu justa viro. Sed al li okazis laŭ sia preĝo, ĉar haste kiel eble plej rapide li estis forironta de ĉi tiu mondo, por atingi la Sinjoron, kiun li amis. 5 Alvelinte do en la havenojn de Romo, dum la malsanktaj ludoj estis jhus finiĝontaj³⁵, la soldatoj komencis enuiĝi pro nia malrapido, sed la gardisto ĝoje obeis al ilia urĝado.

Ignacio disŝirita de la sovaĝaj bestoj en Romo

6:1 De tie do ili plu puŝis la ŝipon ĝis la loko, kiu nomiĝas Porto (jam disfamiĝis ĉio pri la sankta martiro) kaj ni renkontis la fratojn plenajn de timo kaj ĝojo; ĝojantajn efektive, ĉar ili estas konsiderataj indaj renkonti Teoforon, sed trafitajn de timo, ĉar tiel eminenta viro estas kondukata al la morto. 2 Li nun ordonis al kelkaj silenti, kiuj, en sia granda fervoro, diris, ke ili kvietigos la popolon, por ke oni ne petu la morton de ĉi tiu justulo. 3 Per la Spirito li tuj eksciis pri tio, kaj ĉiujn salutinte, kaj petinte ilin montri al li veran amon, kaj traktinte tiun temon pli vaste ol en sia letero, kaj persvadinte ilin, ke ili ne enuiu lin, ĉar li rapidas al la Sinjoro, kaj tiam, dum surgeguiĝis ĉiuj fratoj, li petis la Filon de Dio pri la Eklezioj, ke finiĝu la persekutoj, kaj ke reciproka amo daŭru inter la fratoj, li en plena rapido estis kondukita en la amfiteatron. 4 Tiam, tuj enen ĵetite laŭ ordono antaŭa de la Cezaro, ĉar la publikaj spektakloj estis

³⁴ Agoj 28:11-12.

³⁵ Fino de la gladiatoraj ludoj tiujare.

finiĝontaj (estis ja epifanio³⁶, laŭ ilia diro, en Latina lingvo la dektria tago, dum kiu la publiko kutimas kunveni plinombre), li estis metita antaŭ la sovaĝajn bestojn tuj flanke de la templo, tiel ke plenumiĝis la deziro de la sankta martiro Ignacio, laŭ tio, kio estas skribita: *kion deziras piuloj, tio estos donita al ili*³⁷, tiel ke al neniu el la fratoj li fariĝu ĝeno per la kolektado de la restaĵoj, same kiel anticipe en sia letero li esprimis la deziron, ke tio estu lia fino. 5 Ĉar nur la pli duraj eroj de liaj sanktaj restaĵoj postrestis, kion oni kondukis al Antioĥio kaj volvis en tolo, kiel netaksebla trezoro lasita de la martiro por la sankta eklezio.

Ignacio aperas postmorte en vizio

7:1 Tio ĉi okazis la dektrian tagon antaŭ la kalendoj de januaro, tio estas la dudekan de decembro, dum Sura kaj Senecio duafoje estis konsuloj ĉe la Romanoj. 2 Ĉar ni mem estis okul-atestantoj pri ĉio ĉi, kaj ni pasigis la tutan nokton plorante en la domo, kaj petis la Sinjoron, kun fleksitaj kruroj kaj multa preĝado, ke Li donu al ni malfortaj homoj plenan certecon pri ĉio okazinta, tiam, dum mallonge ni ekdormetis, okazis, ke kelkaj el ni subite vidis la benatan Ignacion stari apud ni kaj brakumi nin, dum aliaj el ni vidis lin preĝi por ni, aŭ verŝi sian ŝviton, kvazaŭ li ĵus venis el peza laboro, tie starante ĉe la Sinjoro. 3 Kiam do, kun granda ĝojo, ĉiujn ĉi aferojn ni vidis, kaj komparis niajn diversajn viziojn inter ni, ni laŭdo-kantis Dion, la donacanton de ĉio bona, kaj montris nian feliĉon pri la sankta martiro; kaj nun ni sciigis al vi kaj la tagon kaj la tempon, por ke, kunvenante ĉirkaŭ la tempo de lia martiriĝo, ni unuiĝu kun ĉi tiu ĉampiono kaj nobla martiro de Kristo, kiu piedpremis la Diablon kaj plenumis la kuron, kiun pro amo al Kristo li deziris, en Kristo Jesuo, nia Sinjoro.

Per Li kaj kun Li estu la gloro kaj forto al la Patro, kun la Sankta Spirito, por la epokoj de la epokoj! Amen.

³⁶ Laŭlitere: apero (de iu Dio). Certa Romia festo.

³⁷ Sentencoj 10:24.